



**UvA-DARE (Digital Academic Repository)**

**Universitato de Torino (IT): Retrospektive al kursoj pri interlingvistiko en la lastaj jaroj**

Gobbo, F.

*Published in:*  
Informilo por Interlingvistoj

[Link to publication](#)

*Citation for published version (APA):*

Gobbo, F. (2013). Universitato de Torino (IT): Retrospektive al kursoj pri interlingvistiko en la lastaj jaroj. *Informilo por Interlingvistoj*, 86, 7-9. [http://esperantic.org/dosieroj/file/lpl3\\_%2086%20%20\(3%20-%202013\).pdf](http://esperantic.org/dosieroj/file/lpl3_%2086%20%20(3%20-%202013).pdf)

**General rights**

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

**Disclaimer/Complaints regulations**

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <https://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

## Enhavo

1	Fakaj aranĝoj en Rejkjaviko .....	2
1.1	La 66-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato .....	2
1.2	La 36-a Esperantologia Konferenco .....	2
1.3	Kunveno de CED .....	3
1.4	La 6-a Nitobe-Simpozio en Rejkjaviko .....	3
1.4.1	La Nitobe-simpozioj .....	3
1.4.2	La sesa Nitobe-simpozio: Anglalingva instruado en neanglalingvaj universitatoj .....	4
2	Okazontaj lingvistikaj kongresoj .....	4
3	El Universitatoj kaj Altlernejoj .....	5
3.1	Universitato de San Diego (US): Lingvistiko en Hollywood (Grant Goodall).....	5
3.2	Universitato de Calgary (CA): Multdisciplinaj aliroj al lingvopolitiko kaj lingvoplanado .....	5
3.3	Eŭropa Universitato Viadrina (DE): Migrado kaj Minoritatoj .....	6
3.4	Universitato de Amsterdam (NL): Bilanco de la katedro Interlingvistiko/Esperanto .....	6
3.5	Universitato de Torino (IT): Retrospektive al kursoj pri interlingvistiko (Federico Gobbo).....	7
3.6	Universitato Adam Mickiewicz Poznań (PL): Interlingvistikaj studoj (Ilona Koutny).....	9
3.7	Universitato de Zagreb (HR): Interlingvistikaj ekzamenoj.....	10
3.8	Doktorigaj disertacioj .....	10
3.8.1	<i>Ángela Campo</i> pri <i>Eugen Wüster</i> .....	10
3.8.2	<i>James McElvenny</i> pri <i>C.K. Ogden</i> .....	11
3.9	Esperantlingvaj fakaj universitataj kursoj en la reto .....	11
3.10	Superrigardoj pri Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj.....	11
3.11	Universitataj instrulibrooj .....	11
3.11.1	Instrulibrooj pri interlingvistiko de Eötvös-Loránd-Universitato Budapest.....	11
3.11.2	Faktekstaj librooj de Kossúth-Lajos-Universitato Debrecen .....	13
4	<i>Esperanto Studies Foundation (ESF)</i> – bona evoluo en 2012 .....	13
5	Blogo: „History and Philosophy of the Language Sciences“ .....	14
6	Bibliografioj .....	15
6.1	Resuma servo „Linguistics and Languages Behavior Abstracts“ (LLBA).....	15
6.2	„Esperantisto Slovaka“ 1946-2000.....	15
6.3	„Zagreba Esperantisto“ 2007-2012.....	16
6.4	Detaloj pri la selekta bibliografio de <i>Irmí kaj Reinhard Haupenthal</i> .....	17
6.5	Interlingvistika bibliografio de <i>Emmanuel Wald</i> en la reto .....	17
7	KAEST 2012: Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj.....	17
8	UEA en la Estraro de <i>Infoterm</i> .....	19
9	Lingvopolitiko .....	19
9.1	Globish?.....	19
9.2	<i>Jakob Haselhuber</i> pri eŭropa plurlingveco.....	20
10	Esperantologiaj tekstoj .....	21
10.1	„Esperantologio – Esperanto Studies“ kajero 6 .....	21
10.2	Aktoj de la 35-a Esperantologia konferenco en Hanojo 2012.....	22
10.3	„Lingva Kritiko“ – Esperantologio en la reto.....	22
11	Interlingvistikaj Kajeroj – Inkoj.....	23
12	Aktuala Bibliografio I (Detlev Blanke).....	24
13	Bibliografio de latinaj verkoj (Brian Bishop).....	29
14	Persona bibliografio de <i>Federico Gobbo</i> .....	32
15	Nekrologoj.....	34
15.1	<i>Werner Bormann</i> (17.10.1031 – 16.5.2013) .....	34
15.2	<i>Hermann Behrmann</i> (12.7.1935 – 28.6.2013).....	35

# 1 Fakaj aranĝoj en Rejkjaviko

Kadre de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (20.-27. Julio 2013) laŭtradicie okazis kelkaj fakaj aranĝoj interlingvistike gravaj:

## 1.1 66-a Sesio de la Internacia Kongresa Universitato

Rektoro de la 66-a sesio estis la norvega hispanisto *Otto Prytz* (Universitato Oslo).

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Věra Barandovská-Frank: *Insulo Thule vera kaj fikcia*

Jane Edwards: *Krimo en malvarma klimato: la fenomeno de la skandinava krimromano*

Geoffrey Greatrex: *Pri la malfrua Romia Imperio*

Hannes Larsson: *La violono*

Jouko Lindstedt: *Ĉu lingvoj evoluas simile al biologiaj specioj?*

Otto Prytz: *La "nov-norvega" lingvo Nynorsk, lanĉita de Ivar Aasen, kaj la Lingvo Internacia Esperanto, lanĉita de L.L. Zamenhof - similaĵoj kaj diferencoj*

Tsvi Sadan: *Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: Problemoj de interkultura komunikado en Esperanto*

José Antonio Vergara: *La insula edeno de Darwin: la Galapagoj kaj la historio de evolu-biologio*

Amri Wandel: *Aŭroro — la nordia lumo*

Resumoj de la prelegoj: <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/prelegoj.php?jaro=2013>.

Ĉiuj tekstoj kun resumoj en Esperanto, la Angla, Franca kaj Islanda aperis jene:

*Wandel, Amri/McCoy, Roy (2013): Internacia Kongresa Universitato. 66-a Sesio. Rejkjaviko, Islando 20-27 julio 2013. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 136 p. (ISBN 978 92 9017 122 5)*

## 1.2 La 36-a Esperantologia Konferenco

Dum la konferenco oni prezentis jenajn prelegojn:

Eckhard Bick: *La kunteksta vortaro DeepDict: Korpusa leksikografio en Esperanto*

Probal Dasgupta: *'Postkuri' ne estas 'kuri post': Esperanto kaj la plenvorta morfologio*

USUI Hiroyuki: *Prasennaciismo en oriento: japana ultranaciisto kaj ĉinaj anarkiistoj*

Detlev Blanke: *Pri kelkaj lastatempaj esperantologiaj publikigaĵoj*

José Antonio Vergara: *Interskola ponto en Interlingvistiko: du reformprojektoj de Esperanto motivitaj de Interlingua*

Guðrún Kvaran: *Islanda lingvopolitiko, la leĝo pri la islanda lingvo kaj la taskoj de la Islanda Lingvokonsilio* (la dana originalo estis interpretita esperanten)

La konferencon preparis kaj gvidis *Christer Kiselman* kaj *Mélanie Maradan*.

Pri la esperantologiaj konferencoj ankaŭ vidu:

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantologia\\_Konferenco/](http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantologia_Konferenco/)

### 1.3 Kunveno de CED

La *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj* (CED), sub gvido de *Humphrey Tonkin* okazigis sian sciencorganizan kunvenon kadre de la UK. Oni informis i.a. pri la ĉi-jara Nitobe-simpozio (vidu 1.4), pri planataj aranĝoj pri lingvopolitiko kaj pri universitata instruado. Regule aperadas *Language Problems & Language Planning* (ekde 2013 ĉefredaktoras Timothy Reagan) kaj *Informilo por Interlingvistoj*. Tradicias la esperantologiaj konferencoj, daŭras bibliografiado en Modern Language Association/MLA (nun fare de *Wim Jansen*) k.a. La usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*, ESF, (gvidata de *Mark Fettes*) subvencias tiujn kaj aliajn iniciatojn, i.a. [www.lernu.net](http://www.lernu.net), [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La CED-fondaĵo, subfondaĵo de ESF, aparte subvencias interlingvistikajn esplorojn akj publikaĵojn (<http://esperantic.org/eo/>).

Proponojn oni direktu al Detlev Blanke: [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de)

### 1.4 La 6-a Nitobe-Simpozio en Rejkjaviko

#### 1.4.1 La Nitobe-simpozioj

La Nitobe-simpozioj estas nomitaj honore al *Nitobe Inazō* (1862-1933), japana diplomato de la 1920aj jaroj, kiu estis Unua Vica Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj kaj kiu prezentis al la monda organizaĵo raporton pri „Esperanto kiel internacia helplingvo“. Li do pioniris la serĉon por internacia lingva interkompreno. Tiuj lingvopolitikaj simpozioj estas organizataj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvoj Problemoj (CED), kunlabore kun Esperanto Studies Foundation (ESF), diversaj universitatoj, neregistaraj organizaĵoj kaj aliaj lingvopolitikaj institucioj.

Ĝis nun okazis jenaj Nitobe-simpozioj:

La *unua Nitobe-simpozio* okazis kadre de la 81-a UK en Prago (20.- 23. 07. 1996) kaj traktis problemojn de lingvo-politiko, lingvo-praktiko, lingva diverseco, lingva demokratio kaj lingvoj en la internacia komunikado.

La *dua Nitobe-simpozio* okazis kadre de la 84-a UK (02. - 03. 08. 1999) en Berlin kaj traktis la problemojn de la tutmondiĝo kaj lingva diverseco.

La *tria Nitobe-simpozio* okazis periferie de la 89-a UK (25.-26.07.2004) en Pekino. Ĝi pledis per siaj prelegoj por „nova internacia lingvo-ordo“.

La *kvara Nitobe-simpozio* okazis post la 90-a UK (30.07.-01.08.2005) en la litova parlamento en Vilno. La simpozio klopodis diskuti la lingvo-problemojn de EU frontitajn de la novaj membro-ŝtatoj.

La *kvina Nitobe-simpozio* okazis antaŭ la 92-a UK (02.-03. 08.2007) en la Sophia-Universitato de Tokio. Ĝi traktis problemojn de justa lingvopolitiko en Azio.

#### **1.4.2 La sesa Nitobe-Simpozio: Anglalingva instruado en neanglalingvaj universitatoj**

Disvastiĝo de la angla kiel instrulingvo en pluraj landoj de la mondo estis la temo de la ĉi-jara Nitobe-simpozio, kiu okazis de la 18a ĝis 20a de julio 2013 en Rejkjaviko, Islando. La lastaj jaroj estas markitaj per sentebla kresko de la kvanto de kursoj kaj programoj, aparte je la magistra nivelo, instruataj ĉu tute ĉu parte en la angla – la respondo al la grandiganta movebleco de studentoj kaj la kreskanta intereso de universitatoj pri internaciaj pritaksoj, kio igas diversajn tipojn de universitatoj tra la mondo konkurenci por rimedoj, ĉefe esplorsubvencioj, kaj por altigi nacian kaj internacian prestiĝon.

La simpozio, kiun organizis la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kunigis tre diversecan grupon de 40 invititaj specialistoj pri supera edukado el 23 landoj, ekde Usono, Kanado, Irlando kaj Britio ĝis Ĉinio, Japanio, Ĉilio, Meksiko, Kipro, Kazahio, Azerbajĝano kaj Hindio. La nordiaj landoj (Finnlando, Svedio, Danio, Norvegio kaj Islando) estis aparte bone reprezentitaj. La aperigota libro, *English in Nordic Universities: Ideology and Practice*, redaktita de *Anna Kristina Hultgren*, *Frans Gregersen*, kaj *Jacob Thøgersen*, eldonota de John Benjamins, Amsterdamo, estis la tuja inspiro por la simpozio.

Festparoladojn faris *Rainer Enrique Hamel* (Meksiko), *Michele Gazzola* (Germanio/Italio) kaj *F. Xavier Vila* (Katalunio, Hispanio).

„Dum la uzo de ununura lingvo en supera edukado evidente faciligas la fluon de informo internacie, ĝi privilegias iujn homojn kaj malavantaĝigas aliajn, kaj ofte ĝin antaŭenigas akademia prestiĝo, pli ol akademia elstareco“, komentis *Humphrey Tonkin* (Usono), unu el la organizintoj de la simpozio. „Ĝi ankaŭ erozias la kapablon de naciaj kaj lokaj sciencaj kulturoj rilati kun la lokanoj, inkluzive gejunulojn“, li aldonis. Estas urĝa bezono trovi aliajn, multlingvajn solvojn, li sugestis.

La simpozion, kiu okazis en la Islanda Nacia Muzeo, financis ESF (Esperantic Studies Foundation), kun aldona subteno de la eldonejo John Benjamins. La simpozio okazis sub la aŭspicioj de la Instituto Árni Magnusson por Islandaj Studoj, la Konsilio de la Islanda Lingvo, kaj la Instituto Vigdis Finnbogadóttir por Fremdaj Lingvoj. *Ari Páll Kristinsson*, de la Instituto Árni Magnusson, prizorgis la lokan organizadon.

La anglalingva programo estas konsultebla: <http://esperantic.org/en/nitobe2013>.

(CED/ESF)

## **2 Okazontaj lingvistikaj kongresoj**

Ni ricevis informojn pri du lingvistikaj kongresoj, okazontaj en 2014. Eble interlingvistoj povus partopreni (?):

La sekva kongreso de *AILA (Association Internationale de Linguistique Appliquée /International Association of Applied Linguistics)* okazos 10.-15. Aŭgusto 2014 en Brisbane/Aŭstralio. <http://www.aila2014.com>.

La *International Federation for Modern Languages and Literatures* okazigos sian XXVI-an internacian kongreson pri „Languages and Literatures Today“ de 17.-19. Junio 2014 ĉe la University of Nottingham Ningbo in Ningbo/PR Ĉinio:  
<http://www.fillm.org/ningbocallforpapers.html> .

### 3 El Universitatoj kaj Altlernejoj

#### 3.1 Universitato de San Diego (US): Lingvistiko en Hollywood

En San Diego, Kalifornio (Usono), pli ol 700 homoj ĉeestis publikan simpozion la 19-an de aprilo 2013, pri la utiligo de lingvistiko en la kreado de novaj lingvoj por sciencfikciaj kaj fantaziaj filmoj kaj televidprogramoj. Titolita “Lingvistiko en Holivudo” (“Linguistics Goes to Hollywood”), la simpozio festis la 50-an datrevenon de la fondiĝo de la fakoj pri lingvistiko en la Universitato de Kalifornio en San Diego kaj altiris multe da atento de la amas-komunikiloj.

La programo komenciĝis per bonveniga parolado de *profesoro Eric Baković*, kiu kune kun profesoro *Robert Kluender* (ambaŭ profesoroj pri lingvistiko) organizis la eventon. *Profesoro Baković* substrekis la similecon inter la konscia kreado de lingvo fare de fakuloj por literaturaj aŭ filmaj celoj kaj la malpli konscia kreado de la denaska lingvo fare de infanoj.

Poste *profesoro Grant Goodall*, reĝisoro de la simpozio, mallonge skizis la riĉan kaj ne tre konatan historion de “inventitaj lingvoj”, de *Leibniz* kaj *Zamenhof* ĝis hodiaŭ, en kiu li emfazis la streĉan interplektiĝon de tiuj lingvoj kun la historio de lingvistiko ĝenerale kaj la intelekta fono en kiu ili naskiĝis.

Post tiu enkonduko, li prezentis la tri honorajn gastojn de la simpozio: *Marc Okrand*, kreinto de la lingvo *Klingon* por la usona televid- kaj film-serio *Star Trek*, *Paul Frommer*, kreinto de la lingvo *Na’vi* por la filmo *Avatar*, kaj *David J. Peterson*, kreinto de la lingvo *Dothraki* por la televidprogramo *Game of Thrones*. Sekvis ampleksa konversacio inter tiuj tri kaj *profesoro Goodall* pri la gramatikaj aspektoj de iliaj lingvoj, la maniero laŭ kiuj ili elektis specifajn morfemojn, vortojn aŭ aliajn trajtojn, la dinamiko inter la strukturo de la lingvo kaj la bezonoj de la filmo aŭ televidprogramo, kaj la iom surpriza estiĝo de komunumo de parolantoj de tiuj lingvoj.

Post 50-minuta konversacio, oni invitis ankaŭ la ĉeestantojn starigi demandojn, kion ili faris amase kaj entuziasme.

Oni filmis la tutan simpozion kaj esperas disponigi tion al la publiko fine de 2013. Intertempe, mallonga reklamfilmo pri la evento, kun specimenaj elparoloj en la tri lingvoj kaj Esperanto, videblas en <http://youtu.be/dbpal-4IMwA> . (Grant Goodall)

#### 3.2 Universitato de Calgary (CA): Multdisciplinaj aliroj al lingvopolitiko kaj lingvoplanado

Inter la referaĵoj, prezentitaj en la kolokvo (05.-07.09. 2013) de la kanada universitato, estis “Esperantikaj studoj kaj lingva mastrumado en tutmondigita terĝlobo” de *Humphrey Tonkin*, Universitato de Hartford, Usono, kaj *Mark Fettes*, Universitato Simon Fraser, Kanado

##### Resumo:

La rilato inter planlingvoj kaj lingvoplanado estas nesufiĉe studata. Planlingvoj proponas alternativan matricon, per kiu oni povas ekzameni lingvomastrumadajn demandojn en tutmondigita medio, kaj taksu la sukcesojn kaj malsukcesojn de lingvoplanaj strategioj. La

referaĵo sugestas diversajn esplorfadenojn inter la kampo de interlingvistiko unuflanke kaj la kampo de lingvoplanado aliflanke, per klopodo situigi la ideologion de Esperanto en la kuntekston de konceptoj pri “lingva kosmopolitismo”.

Inter aliaj referaĵoj, prezentitaj en la konferenco, estis tiuj de *Michele Gazzola* (pri lingvoplanado kaj lingva justeco en la Eŭropa Unio) kaj *François Grin* (pri opinioj pri lingvopolitiko inter svisaj junuloj). Du referaĵoj tuŝis la temon de la lastatempe okazinta Nitobe-seminario en Rejkjaviko, nome tiuj de *Marie Källkvist* kaj *Francis Hult* pri la principo de “paralela lingva uzado” en svedaj universitatoj, kaj tiu de *Rita Cancino Troncoso* pri multlingvismo en danaj universitatoj kaj la rolo de la angla lingvo.

### **3.3 Eŭropa-Universitato Viadrina (DE) Migrado kaj Minoritatoj**

La 14-an kaj 15-an de junio 2013 en la Eŭropa Universitato Viadrina (Frankfurt/Odro) okazis kolokvo de esploristoj pri la temo „Migrado kaj minoritatoj“. Dank al la influo de prof. KIMURA Goro, kiu faris esplorojn en tiu ĉi universitato, planlingvoj iel estis komprenataj kiel „minoritataj lingvoj“ kaj sekve trovis lokon en la programo.

Okazis du prelegoj lige al planlingvoj:

KIMURA Goro (Tokio/Frankfurt/Oder)

*Plurlingveco en la germana-pola limregiono – bilanco de unujara esplor-restado* (kun klara mencio de Esperanto kiel lingvo de germanaj-polaj kontaktoj)

Detlev Blanke (Berlin)

*Universalaj lingvoj inter utopio kaj realeco*

### **3.4 Universitato de Amsterdam (NL): Bilanco de la katedro Interlingvistiko/Esperanto 2002-2013**

Fine de la somera semestro 2013 en la Universitato de Amsterdam finiĝis la laborperiodo de *prof. d-ro Wim Jansen*, kiu ekde 2002 gvidis la katedron „Interlingvistiko/Esperanto“, unika en la mondo. La katedrestro estas homo kun nekutima scienca kariero. Lia origine studita profesio estis tiu de inĝeniero pri aviada kaj spacvetura tekniko. Li unue laboris kiel reprezentanto de Organizaĵo pri Spacveturado de Eŭropa Unio (European Space Agency, ESA), dum kelka tempo kun oficejo en Moskvo. Wim Jansen aliflake plukleriĝis kaj en 1989 magistriĝis pri lingvistiko, fariĝinte unu el la malmultaj nederlandaj specialistoj pri la eŭska lingvo. En 2002 li estis nomumita docento pri interlingvistiko/Esperanto en la Universitato de Amsterdam, doktoriĝis en 2007 pri esperantologia temo kaj estis nomumita eksterordinara profesoro.

11 akademiaj jaroj estas por bilanci. Malsame al aliaj interlingvistoj<sup>1</sup>, kiuj en la pasinteco instruis interlingvistikon en universitatoj, prof. Jansen prezentas bilancon kaj krom tio daŭre raportis pri sia agado per la speciala cirkulero „La Amsterdama Katedro“, de kiu ĵus aperis la lasta, la 23-a eldono. Aldone al la disertacio (n-ro 1) kvar materialriĉaj volumoj informas pri unika laboro:

---

<sup>1</sup> Tamen vd. la skizon de Detlev Blanke: Pri Esperanto kaj interlingvistiko en Humboldt-Universitato Berlin. Kelkaj personaj spertoj. *Informilo por Interlingvistoj* 18 (2009)1 (68), p. 4-8.

1. JANSEN, Wim (2007): *Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universaliala. La vortordo en Esperanto. (Resumoj en Esperanto, Angla, Germana)*, Amsterdam: Center for Language and Communication /LOT Netherlands Graduate School of Linguistics, 283 p. (doktoriga disertacio)

2. JANSEN, Wim (2013): *Inleiding in de interlinguïstiek. Syllabus bij de keuzemodule Interlinguïstiek. Studiejaar 2012-2013*. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam, 285 p. (Enkondulo en interlingvistikon).

3. JANSEN, Wim (2013, Red.): *Esperanto. Syllabus bij de keuzemodule Esperanto en het leerboek Esperanto via de directe methode (Stano Marček, 2007)*. Studiejaar 2012-2013. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam, 84 S. (Kurslibro surbaze de la rekta kurso de Stano Marček, sed adaptita al la universitataj bezonoj).

4. JANSEN, Wim (2013, Red.): *Administratieve mijlpalen van de bijzondere leerstoel Interlinguïstiek en Esperanto. Universiteit van Amsterdam, 2002-2013. Administraj mejloŝtonoj de la speciala katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto. Universitato de Amsterdamo, 2002-2013, 62 Dokumentoj*.

5. aperonta: JANSEN, Wim (2013, Red.): *Novajbultenoj kaj malgrandaj publikigoj de la speciala katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto, 2002-2013*. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam.

Kiel legeblas en n-ro 23 de „La Amsterdama Katedro“ al la scienca bilanco krome apartenas 3 ĉapitroj en antologioj, 3 broŝuroj, 9 sciencaj artikoloj, 5 recenzoj kaj 4 popularsciencaj artikoloj. Kune kun la supre menciitaj unuaj tri titoloj la lingvoj de la publikaĵoj estas: 9 nederlandaj, 7 esperantlingvaj, 5 germanaj, 5 anglaj kaj 1 itala. Do, fariĝas klare, ke malsame al aliaj sciencaj publikaĵoj, la angla ne dominas (pri la universitata paĝo vidu la noton)<sup>2</sup>.

La 28. 09. 2013 prof. Jansen faris sian solenan adiaŭnan prelegon antaŭ pli ol 70 ĉeestantoj. (Katalin Kováts registris la eventon: <http://www.edukado.net/novajhoj?id=385>).

Ankaŭ estonte li ne restos senaga. Li jam transprenis la interlingvistikan sekcion en la bibliografio de Modern Language Association (kiun antaŭe priservis Humphrey Tonkin kaj Detlev Blanke). Li plue subtenos la sciencon laboron de la katedro.

Kandidato por transpreni la katedron estas la itala lingvisto *d-ro Federico Gobbo*.

Red.

### **3.5 Universitato de Torino (IT): Retrospektive al kursoj pri interlingvistiko en la lastaj jaroj**

*Federico Gobbo  
Universitato de Torino*

Pro la Bolonja procezo en EU (kiu enkondukis la tri-ciklan sistemon en la universitatan edukadon) kaj grava reformo de la itala Ministerio de Edukado, Universitato kaj Esplorado (MIUR), la kurso en Interlingvistiko kaj Esperantologio, siatempe gvidata de prof-o *Fabrizio A. Pennacchietti*, ne povis plu ekzisti. Do ekestis la demando kiel vivteni la “interlingvistikan skolon” de Torino, kies fama membro estas *Giuseppe Peano*. La solvo estis en la kreado de la

---

<sup>2</sup> <http://www.uva.nl/en/about-the-uva/organisation/staff-members/content/j/a/w.h.jansen/w.h.jansen.html>



nova katedro “Lingvo-Planado kaj Plan-Lingvoj” (LPPL), en jaro 2010, gvidata ĝis nun de *d-ro Federico Gobbo*. Temas pri nedeviga kurso, speciale destinita al magistras studentoj en lingvosciencoj, kiuj devas akiri konsiderinde grandan kvanton da kreditoj en lingvistik-rilataj fakoj. Studentoj devas jam koni la bazajn nociojn de ĝenerala lingvistiko je almenaŭ bakalaŭra nivelo, kaj la kurso validas 6 kreditojn (ECTS, laŭ la oficiala nomenklatur).

La ĉefa celo de ĉi tiu kurso estas doni solidan scion pri lingvoplanado, vidpunkte de teorio kaj praktiko per studkazoj. Krome, rigardo al interlingvistiko kiel scienco de planlingvoj antaŭvideblas, sub lingvistikaj, filozofiaj kaj historiaj perspektivoj. Finfine, oni aparte donos atenton al esperantologio, kiel koniva kaj kultura fenomeno. La kurso eĉ donas bazan kurson de la lingvo Esperanto. La horoj enklasaj estas dividitaj en tri egalaj partoj: lingvoplanado, interlingvistiko (vastasence, kiel klarigite sube) kaj fine la lingvo Esperanto. En la akademia jaro 2012-13 estis donita pli da spaco al aktiva lernado, eĉ enklase - tio estas, ĉiu studento pretigis eseeton, prezentandan al la kolegoj dum la lasta leciono en 15 minutoj, plus 5 minutoj por demandoj kaj komentoj. Poste la teksto estas prijuĝata dum la ekzameno, post reviziado, laŭ maniero simila al ordinara samrangula procezo.

La unua parto prias lingvoplanadon. Post analizo de la klasikuloj, ekde *Haugen*, *Kloss* (‘aŭsbaŭ’-lingvo – kontraŭ distanco-lingvoj) kaj diglosio enkonduke de *Ferguson*, oni vidos la intergeneracian ŝtuparon pri vikleco de lingvoj nomita GIDS<sup>3</sup> de *Joshua Fishman*, eĉ per studkazoj -- ĉiun jaron ŝanĝitaj. En 2012-13, oni enklase diskutis la kornvalan studkazon (*Sayers* 2012). Kelkaj fakvortoj kaj la implicoj estas temeroj, ekzemple la distingo inter naciŝtato kaj ŝtat-nacio. Apartan atenton oni dediĉis al tutmondiĝo, kun diskuto de la diferencoj inter “lingva imperiismo” (de *Robert Phillipson*) kaj “lingva justeco” (de *Philippe van Parijs*). La angla kiel *lingua franca* (tiel nomata *ELF*) estas varme debatita temo inter la studentoj: oni diskutis la subtenantojn, kiel *Barbara Seidlhofer* kaj la kritikojn. Eĉ la perspektivoj el post-koloniaj mondopartaj lingvistoj ne estas forgesitaj: ekzemple, la nocio pri Mondaj Anglaj Lingvoj (World Englishes) de *Braj Kachru* kaj la koncerna esplorkomunumo. Oni pritraktis ankaŭ la nocion de oficiala lingvo kaj laborlingvo – ekde la Ligo de la Nacioj ĝis UN -- antaŭ ol diskuti la malfermajn lingvopolitikajn problemojn de EU. La kontribuoj pri lingvo-ekonomio al lingvo-politiko kaj lingvo-planado estis rapide superrigarditaj per la verkaro de la ĉefaj fakuloj, kiel *François Grin* kaj *Reinhard Selten*.

La dua parto prias interlingvistikon. La nocio de planlingvo, origine germana neologismo kreita de *Eugen Wüster*, estis larĝe motivita kompare kun aliaj, malpli precizaj, difinoj, kiel “artefarita lingvo”, “universala lingvo”, “konstruita lingvo”, ktp., tiel, ke studentoj komprenas kion *vere* signifas ‘artefariteco’ en lingv(aĵ)oj, eĉ konsiderante formalajn fakojn kiel logikon, matematikon kaj teorian informadikon. Multan energion oni metis por klarigi terminologion, tiel, ke studentoj povu enprofundiĝi en la fakon eĉ post la ekzameniĝo, laŭplaĉe. Samkiale, literaturo estas oportune klarigita. Interlingvistiko -- kaj same esperantologio -- havas literaturon faritan de “miriada da fontoj” (*Blanke* 2003) ofte malfacile akireblaj, kaj studentoj facile povas perdiĝi. Krome, por jardekoj ‘interlingvistiko’ estis sinonimo de “scienco de internaciaj helplingvoj”. Tamen, hodiaŭ du temaroj devus esti aldonitaj: unue, lingvoj planitaj por ne-helpaj celoj, sed por ludoj, fikcio kaj simile (pripensu la Klingonan, la lingvojn de Tolkien aŭ la lastatempan Dotrakan), due, revivigo kaj promociado de minoritataj lingvoj, kio montras analogion (kaj diferencon), kiun oni devas nepre konsideri.

Ĉiukaze, la plejmulto de la tempo estis dediĉita al helplingvoj, prezentitaj laŭ historia perspektivo, t.e. sekve al la serĉado de la ‘perfekta lingvo’, kiel *Eco* pritraktis (1996). Post la intuicioj de *Kartezio* kaj *Leibniz*, oni enprofundiĝis en la helplingvojn, proponitajn en la 19-a kaj 20-a jarcentoj, aparte traktis la helplingvojn, kiuj sukcese formis komunumon de praktiko:

---

<sup>3</sup> Graded Intergenerational Disruption Scale.

Volapuko, Esperanto, Latino sine Flexione, Ido, Novial, Occidental/Interlingue, Interlingua de IALA. Gravas noti, ke esperantologio kaj la lingvo Esperanto estis enkondukitaj ekde la komenco de la lecionaro, paralele al la interlingvistika parto. Ĉi-tiu elekto estas motivita de la fakto, ke studentoj povu diskuti tiklajn partojn de Esperanto -- ekz., kial estas ĉapelitaj literoj en la Esperanta alfabeto? Kial la litero *ĥ* ne estas tiel produktiva? Kiel formiĝis la idiotismo 'krokodili'? ktp. Krome, la historio de la Esperanto-movado interplektiĝas kun la pasintaj konkurantoj, speciale antaŭ la dua mondmilito. Ekz. temas pri la ekstariĝo de UEA kaj la 'Ido-skismo'. La lingvo estas prezentita per realvivaj ekzemploj: prozo, poezio, rok muziko, teatro, organizado de kongreso ktp. La lingva kurso de Esperanto estas donita per rekta metodo. Por la akademia jaro 2013-14, la aŭtoro en Torino donos la kurson en la periodo oktobro - decembro 2013.

(La kursoj estis parte subvenciitaj de Esperanto Studies Foundation, ESF).

## Menciita literaturo

Blanke, D. (2003), „Interlinguistics and esperanto studies: Paths to the scholarly literature“, *Language Problems and Language Planning* 27(2), 155–192.

Eco, U. (1996), *La serĉado de la perfekta lingvo*, Pisa: Edistudio.

Sayers, D. (2012), „Standardising cornish: The politics of a new minority language“, *Language Problems and Language Planning* 36(2), 99–119

### 3.6 Universitato Adam Mickiewicz Poznań (PL) Interlingvistikaj studoj

Dum la tria semajno de septembro 2013 la pola urbo Poznań reeĥas Esperantan parolon, ĉar jam ekde 1998 dum tiu semajno okazas sesio de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) kaj tuj post ĝi, ĉi-jare jam la 29-an fojon, la semajnfina kultura aranĝo Arkones.

La aktuala interlingvistika grupo - tri brazilanoj, du svisoj, po unu germanino, rusino, hungaro kaj polo - komencis sian trian studjaron. *István Ertl* prezentis panoramon de la nuntempa Esperanta literaturo. La grupo laboris en tri specialiĝoj: pri internacia kaj interkultura komunikado (lingvistikaj kaj sociologiaj aspektoj) kun *Ilona Koutny* kaj *Zbigniew Galor*, pri literaturo (beletra tradukado) kun *István Ertl*, kaj pri lingvopedagogio kun *Katalin Kováts* kaj *Ilona Koutny*.

La trian specialiĝon povis partopreni la grupo de la unujara instruista trejnado, komuna aranĝo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj edukado.net. La dek unu aliĝintoj (el Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Japanio, Kanado, Pollando kaj Portugalio) laboris fervore pri metodologio de lingvoinstruado kaj speciale pri tiu de Esperanto. Ili konatiĝis ankaŭ kun tiklaj problemoj de la Esperanta gramatiko sub la gvido de *Ilona Koutny* kaj donace povis partopreni en kelkaj okupoj de la interlingvistika grupo.

Al la programo kontribuis *Stefan MacGill*, eksprezidanto de ILEI kaj nuna vicprezidanto de UEA, pri kursplanado surbaze de la kurso "Esperanto etape"<sup>4</sup>. La merkreda komuna vespero okazis en bona etoso kun skeĉoj de *MacGill*, muziko de *Suzanna Kornicka* kaj komuna kantado ĉe tabloj kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kelkaj kursanoj ricevas faciligon por la partopreno per stipendioj de UEA, ILEI kaj la fonduso ESF. Tiuj instancoj disponigas stipendiojn, ĉar ili komprenas la gravecon ne nur lanĉi novajn iniciatojn, sed ankaŭ protekti ĝisnunajn atingojn. La nuna trijara kurso finiĝos en 2014. UEA, ILEI, UAM kaj aliaj aktive nun laboras, por ke nova trijara kurso povu komenciĝi en septembro 2014.

(*Ilona Koutny*)

---

<sup>4</sup> Vidu <http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=56457037>.

### **3.7 Universitato de Zagreb (HR): Interlingvistikaj ekzamenoj**

Ĉe la Filozofia Fakultato de la Universitato Zagreb interlingvistiko kaj Esperanto ne estas nekonataj. Dank al la sistema laboro de la orda profesoro pri germanistiko, *Prof. Velimir Piškorec*, prelegoj kaj seminarioj pri interlingvistiko kaj Esperanto ne estas maloftaĵoj. En la studjaro 2012/13 denove okazis kurso „Interlingvistiko kaj la strukturo de Esperanto“. Dum junio 2013 24 studentoj sukcese ekzameniĝis.

(Laŭ *Zagreba Esperantisto* 2/13)

### **3.8 Doktorigaj disertacioj**

#### **3.8.1 *Ángela Campo pri Eugen Wüster***

*Campo, Ángela (2012): The Reception of Eugen Wüster's Work and the Development of Terminology. Thèse présentée à la Faculté des études supérieures. En vue de l'obtention du grade Philosophiae Doctor (Ph.D.) en traduction, option terminologie. Université de Montréal. Octobre 2012, 320+VI+XV+XIV S.*

#### Komentoj

1. En la disertacio la aŭtorino sub ‚terminology‘ komprenas la sciencon, fonditan de Eugen Wüster, sed ne la tutecon de terminoj deiu fako.
2. Sendube estas meritplene, esplori kiel kaj en kiuj lingvaj medioj oni komprenis aŭ aplikis la ideojn de Eugen Wüster. Tamen mirigas la fakto, kiun al mi komunikis la aŭtorino, ke ŝi nek konas la germanan nek Esperanton. Ja en la germana Wüster publikigis siajn plej multajn materialojn.
3. La bibliografio de la verkoj de Wüster estas tre nekompleta. Primara literaturo (do verkitaj de Wüster) kaj sekundara literaturo (pri la verkoj de Wüster) en la germana estas nur mankhavaj kaj tiuj en Esperanto preskaŭ ne estas menciita.
4. La aŭtorino tamen utiligis kelkajn interlingvistikajn verkojn (de Detlev Blanke, Wera Blanke, Pierre Janton en la angligo de Tonkin, Humphrey Tonkin, Sabine Fiedler) kaj prave elstarigas la heŭristikan rolon, kiun Esperanto ludis por la estiĝo de la terminologiscienca pensado ĉe Wüster („Esperanto...Wüster's window to terminology“ [p. 40]). Ŝi ankaŭ mencias lin kiel „co-founder of esperantology“ (4) kaj "he left his footprint...to Esperanto studies..."(37). Ankaŭ la ĉapitro pri Wüster kiel esperantisto estas akceptebla (39 ks.).
5. Kelfoje kaj en la ĝusta kunteksto la aŭtorino mencias 'planned languages' (22-23, 25, 31, 35, 40, 41, 50, 52-54, 66, 79, 84, 110, 112, 199, 251), eĉ 'esperantology' (40, 52) kaj 'interlinguistics' (32, 112).
6. Kvankam la aŭtorino kelkloke mencias Drezon kaj lian kunlaboron kun Wüster (31, 32, 80, 111-113, 211, 303), eĉ ne unu titolo de li aperas en la ampleksa bibliografio (291-320).
7. Interesatoj trovos la kompletan PDF-tekston sub:

<https://papyrus.bib.umontreal.ca/xmlui/handle/1866/9198;jsessionid=3A308E9FD5E3A87883BA3BCBB46803A8?show=full> (Ĉe la fino de la longa paĝo troviĝas PDF-indiko. Tie oni klaku kaj iom atendu, kaj la ampleksa manuskripto aperos).

(Mi dankas al *Mélanie Maradan* pro la atentigo pri la disertacio).

*Detlev Blanke*

### **3.8.2 James McElvenny pri C.K. Ogden**

*McElvenny, James (2013): Meaning in the Age of Modernism: C.K. Ogden and his contemporaries. Sydney: University of Sydney, Department of English, 220 S.*

(Prijuĝantoj: *John Joseph, University of Edinburgh; Friedrich Stadler, Universität Wien; Marcus Tomalin, University of Cambridge*). (Ogden i.a. iniciatis Basic English). Pluaj informoj pri la disertacio sekvos.

## **3.9 Esperantlingvaj universitataj kursoj en la reto**

Estonte oni trovos universitatnivelaĵajn kursojn pri diversaj fakoj en la reto, laŭ la modeloj de OPEN-programoj de la usonaj universitatoj Berkely kaj Yale. La kursojn oni filmos kaj senpage metos en la reton. Kurso daŭros proksimume 40 instruhorojn. Jam ekzistas :

„Alfronti Militon” de *prof. Ronald J. Glossop* (Southern Illinois University/Edwardsville/US),  
„Historio kaj Filozofio de la Informadiko“ de *d-ro Federico Gobbo* (Universitato Torino/IT).  
„Astronomio kaj astrofiziko” de *prof. Amri Wandel* (Hebrew University/Jerusalem/IL)

Detalojn oni trovas ĉe: <http://www.universitato.info/index.htm>

## **3.10 Superrigardoj pri Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj**

Jam dum multaj jaroj la belgo *Germain Pirlot* enketas tutmonde pri Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj. La superrigardojn li regule enretigas. La lasta estas pri 2012:

<http://egalite.hu/listo/listindex.htm> .

Aktualan superrigardon li estas kompilanta por 2014. *Germain Pirlot* volonte akceptas taŭgajn informojn: [gepir.apro.@pandora.be](mailto:gepir.apro.@pandora.be))

## **3.11 Universitataj instrulibroj**

Universitatj instrulibroj pri interlingvistiko kaj Esperanto malmultas. Sub 3.4 ni menciis tiun de *Wim Jansen*. Pioniran laboron ĉi-teme realigis hungaroj, aparte *István Szerdahelyi*,

### **3.11.1 Instrulibroj pri interlingvistiko de Eötvös-Loránd-Universitato Budapeŝt**

En la Filologia Fakultato de la ELTE (Eötvös-Loránd-Universitato) en Budapeŝt, katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, en la jaro 1966 oni fondis la fakon „Esperanto – lingvo kaj literaturo“.

Ĝis sia morto (1987) la fakestro estis *doc. d-ro István Szerdahelyi*, kiun oni bedaŭrinde neniam nomumis ‚universitata profesoro’. Ĝis 2009 la diplomfakon daŭrigis disĉiploj de *Szerdahelyi* (inter ili *d-rino Ilona Koutny*, kaj ĝis 2009 kiel docentino *d-rino Zsuzsanna Varga-Haszonits*).

Al la rezultoj de la ĝis nun tute unika kaj multflanka scienca agado de *István Szerdahelyi* (instruado, prelegado, verkado, sciencorganiza laboro ktp.)<sup>5</sup> apartenas la de li verkitaj, redaktitaj aŭ kontrolitaj instrulibro:

#### 1972

Szerdahelyi, István (1972): *Eszperantó*. Bevezetés és nyelvgyakorlatok. (Esperanto. Enkonduko kaj lingvoekzercoj). [Közreadja] Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar. Eldonis Universitato Eötvös Loránd, Filologia Fakultato. Lektorálta Bárczi Géza. Budapest, Tankönyvkiadó, 307 p., represoj 1976 kaj 1989.

#### 1975

Szerdahelyi, István (1975): *Metodologio de Esperanto*. (Metodologio de lingvostudado kaj parolalprogrigo). Az eszperantó módszertana. A nyelvtanulás és beszédelsajátítás módszertana. Budapest: Universitato ELTE BTK [Universitát Eötvös Loránd, Filologiscienca Fakultato], Tankönyvkiadó. Kézirat. Egyetemi jegyzet, 377 p., represo en 1988.

#### 1976

Szerdahelyi, István (Red., 1976): *Esperantologiaj Kajeroj 1*. Budapest: Universitato Eötvös Loránd (ELTE), Filologi-sciencia Fakultato, Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, Fako de Esperantlingvo kaj literaturo, 239 p.

#### 1977

Varga-Haszonits, Zsuzsanna (Red., 1977): *Esperantologiaj Kajeroj 2*. Budapest: Universitato Eötvös Loránd (ELTE), Filologi-sciencia Fakultato, Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, Fako de Esperantlingvo kaj literaturo, 273 p.

Soós, Éva/ Ehman, Beata (Red., 1977): *Esperantologiaj Kajeroj 3*. Budapest: Universitato Eötvös Loránd (ELTE), Filologi-sciencia Fakultato, Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, Fako de Esperantlingvo kaj literaturo, 375 p.

Szerdahelyi, István (1977): *Bábeltől a világnyelvig*. Budapest: Gondolat, 414 p.

#### 1979

Szerdahelyi, István (Red., 1979): *Krestomatío de Esperanta Literaturo*. Vol. I (Tekstoj, dataro, bibliografio). Budapest: Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar. Tankönyvkiadó. Egyetemi jegyzet. Kunlaboris: Abonyi-Nagy Árpád, Benczik Vilmos, Máthé Árpád, Varga-Haszonits Zsuzsa, 466 p.

#### 1980

Szerdahelyi, István (1980): *Bevezetés az interlingvisztikába*: Történeti áttekintés és forrástanulmány) [Közreadja]. Budapest: Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar., 290 p.

Szerdahelyi, István (Red., 1980): *Miscellanea Interlinguistica*. Interlingvisztikai szöveggyűjtemény. Budapest: Eötvös Loránd Tudományegyetem. Tankönyvkiadó. 512 p.

---

<sup>5</sup> La ampleksan verkon de Szerdahelyi prilumas kelkaj ĉapitroj en: Ilona Koutny (2009, red.): *Abunda fonto*. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Red. Poznan: ProDruk & Steleto, ISBN 978-83-61607-32-8, 408 p.. Vidu la enhavon de la libro en IpI 70 (3/2009), p. 34-36.

## 1981

Szerdahelyi, István (Red., 1981): *Krestomatio de Esperanta Literaturo*. Vol. II. Tekstoj, dataro, bibliografio. Budapest: Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar. Kunlaboris: Abonyi-Nagy Árpád, Ehmann Beáta, Máthé Árpád kaj Révész Sándor. Tankönyvkiadó, Kézirat. Egyetemi jegyzet, 325 p.

## 1982

Szerdahelyi, István (Red., 1982): *Krestomatio de Esperanta literaturo*. Vol. III. tekstoj, dataro, bibliografio. Ĉefa kunlaboranto: Révész Sándor; kunlaborantoj: Abonyi-Nagy Árpád, Ehmann Beáta. Budapest: Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar, 476 p.

## 1985

Szerdahelyi, István (1985): *Alkalmazott nyelvészeti alapfogalmak*. [Bazaj nocioj de la aplikata lingvistiko]. Tanulmányok, szemelvények. Egyetemi jegyzet. Budapest: Tankönyvkiadó, 231 p. (dua eldono aperis en 1989).

## 1986

Varga-Haszonits, Zsuzsanna (Red., 1986): *Interlingvistikai szöveggyűjtemény. A naturalista irányzat* [Interlingvistika tekstaro, naturalisma skolo]. Budapest: Tankönyvkiadó, 220 p.

(Pro precizigoj de la materialo mi dankas al Iván Bujdosó kaj Balász Wacha-DB).

### 3.11.2 Faktekstaj libroj de Kossúth-Lajos-Universitato Debrecen

En la 1980-j kaj 1990-j jaroj oni ofertis fakajn kursojn en Esperanto en la Kossúth-Lajos-Universitato en Debrecen/Hungario. Aperis jenaj universitataj tekstlibroj:

Salga, Attila (Red., 1989): *Eszperantó szöveggyűjtemény a bölcsészettudományi kar hallgatói számára*. Debrecen: Kossúth Lajos Tudományegyetem, 208 S. (Esperanto-Krestomatio por studentoj de filologiscienca fakultato).

Kovács, Lajos (Red., 1990): *Esperantlingva krestomatio por studentoj de kemio kun vortaroj esperanta-hungara, hungara-esperanta. Eszperantó nyelvű kémiai szöveggyűjtemény és szótár*. Debrecen: Kossúth Lajos Tudományegyetem, 291 S. (Esperanto-tekstoj por studentoj de kemio).

Mészáros, Béla (Red., 1989): *Eszperantó nyelv és biológiai szöveggyűjtemény egyetemi jegyzet biológus, medikus és agráregyetemi hallgatók részére*. Debrecen: Kossúth Lajos Tudományegyetem (dua pliampleksigita eldono aperis en 1992) 312 S. (Esperanto-tekstoj por studentoj de biologio, medicino kaj agronomio).

Szabó, József (Red., 1993): *Eszperantó nyelvű matematikai szó és szöveggyűjtemény*. Debrecen: Kossúth Lajos Tudományegyetem, 175 S. (Esperanto-tekstoj por studentoj de matematiko).

## 4 Esperanto Studies Foundation (ESF) – bona evoluo en 2012

Eble ne tro rimarkeble de ekstere, la pasinta jaro estis markita per kelkaj gravaj ŝanĝoj ene de ESF (ankaŭ vd. 1.3 ĉi-kajere), skribas Mark Fettes, ESF-prezidanto, en la ĵus aperinta jarraporto de ESF.

La plena raporto legeblas (anglalingve) ĉe  
[http://esperantic.org/dosieroj/file/president\\_2012.pdf](http://esperantic.org/dosieroj/file/president_2012.pdf).

Laŭ Fettes, la jaro 2012 markis gravan transiron de ESF el situacio, en kiu ĝi dependis de siaj investoj por subvencii unuopajn projektojn, al organizaĵo kiu pli aktive varbas donacojn kaj planas longdaŭran evoluigon de siaj projektoj kaj kunlaborantaro. Li konkludas, ke tio postulas pli aktive varbi kaj trejni aktivulojn kaj estraranojn: “Se la malnova ESF povis esti efike gvidata de malgranda grupo de homoj, ĉefe universitatoj, la nova ESF bezonas vastan gamon de scioj, spertoj kaj edukaj fonoj.”

Inter la notindaj sukcesoj de la pasinta jaro, Fettes mencias:

La daŭran kreskon de **Lernu.net**, la plej granda Esperanto-retejo en la mondo, kun pli ol 145 mil registritaj uzantoj kaj ĝis du milionoj da paĝrigardoj semajne. Tra 2012 la Lernu-teamo laboregis por prepari la lanĉon de la nova Lernu, kun nova kurso preparita de la internacia teamo de verkistoj, instruistoj kaj desegnistoj, laŭ la komuna eŭropa referenc-kadro por lingvoinstruado. La nova Lernu havos riĉan multmedian bibliotekon kaj Detalan Gramatikon, tradukitan en pli ol tridek lingvojn.

Daŭran pliampleksiĝon de **Edukado.net**, retejo ĉefe celita por instruantoj de Esperanto. Kun preskaŭ 1,3 milionoj da paĝrigardoj en 2012 kaj pli ol 750 elŝuteblaj materialoj, en aprilo 2013 ĝi preterpasis la sojlon de 3000 aktivaj uzantoj el pli ol cento da landoj. La reta kurso por instruistoj, RITE, festis sian unuan sukcesan jaron, kaj ĉi-printempe la retejo lanĉis novan klerigan ludon.

Signifan progreson de diversaj esplorprojektoj subvenciitaj de ESF, inkluzive de **Springboard to Languages**<sup>6</sup>, brita projekto pri la bazlerneja instruado de Esperanto kiu aperigis 78-paĝan libreton kun teorioj kaj pruvoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto; **la projekto WikiTrans**<sup>7</sup>, kiu liveras altkvalitan aŭtomatan tradukadon de la tuta anglalingva Wikipedia al Esperanto kaj tiel ege plifaciligas kaj plirapidigas la laborojn pri la Esperanta Vikipedio; kaj la sukcesa defendo de **doktora disertacio pri Esperanto**<sup>8</sup> fare de franca esploristo kaj historiisto *Christian Lavarenne*, kun la temo “Esperanto: Ĝia Interna Ideo en siaj originoj kaj kelkaj el siaj esprimoj kaj manifestiĝoj: helpo aŭ obstaklo en la disvastigo de la lingvo”, ĉe la Universitato de Parizo.

Tiuj kaj aliaj atingoj konvinkis pli ol ducenton da homoj donaci al ESF en 2012. Tia helpo estas tre bonvena, substrekas Fettes, sed valoras ankaŭ multaj aliaj kontribuoj, kiel helpinstruado aŭ tradukado ĉe Lernu.net, aŭ la organizado kaj gvidado de esploroj. Ĝuste por pli bone kaj kree respondi al tiaj defioj, ESF aldonis aron da novaj konsilantoj en la lasta jaro (legu pli ĉe <http://esperantic.org/en/communications/news?n=107>).

Vizitu la retejon de ESF, [esperantic.org](http://esperantic.org), por lerni pli pri niaj projektoj kaj ebloj kunlabori. Por subteni ESF-on finance, vizitu [esperantic.org/donacoj](http://esperantic.org/donacoj).

## 5 Blogo : „History and Philosophy of the Language Sciences”

*James McElvenny* atentigis pri blogo kun la titolo „History and Philosophy of the Language Sciences” (<http://hiphilangsci.net/>). Tie eblas publikigi kontribuojn kaj partopreni diskutojn.

---

<sup>6</sup> Vidu IpI 83 (4/2012), p.18.

<sup>7</sup> Vidu <http://wikitrans.net/>.

<sup>8</sup> Vidu IpI 83 (4/2012), p.10.

Inter la ĝis nun (t.e. fino de septembro 2013) aperintaj artikoloj por interlingvistoj apartan intereson trovos jenaj:

*McElvenny, James.* 2013. 'Otto Neurath's Isotype and his philosophy of language'. History and Philosophy of the Language Sciences. <http://hiphilangsci.net/2013/08/21/otto-neuraths-isotype-and-his-philosophy-of-language>

*McElvenny, James.* 2013. 'Otto Jespersen and progress in international language'. History and Philosophy of the Language Sciences. <http://hiphilangsci.net/2013/05/15/otto-jespersen-and-progress-in-international-language/>

*Libert, Alan Reed.* 2013. 'Theoretical linguistics and artificial languages'. History and Philosophy of the Language Sciences. <http://hiphilangsci.net/2013/05/29/theoretical-linguistics-and-artificial-languages/>

Partoprenemuloj en la blogo kontaktu *James McElvenny*: [james.mcelvenny@gmail.com](mailto:james.mcelvenny@gmail.com).

## 6 Bibliografioj

### 6.1 Resuma servo „Linguistics and Language Behavior Abstracts“ (LLBA)

La internacia anglalingva servo de resumoĵoj „Linguistics and Language Behavior Abstracts“ (LLBA), eldonata en Ann Arbor (Usono, antaŭe en San Diego), aperadas jam 47 jarojn (ISSN: 0888-8027).

Aparte en la sekcio 18 (international languages), sed ankaŭ en aliaj sekcioj, oni ofte trovas resumoĵojn de interlingvistikaj materialoj diverslingvaj.

En Vol. 46 (2012), 4 (October), en la sekcio 4700 „theory of linguistics“, subĉapitro 10 „linguistics pedagogy, philosophy, and theory“ ni trovas ekzemple kontribuojn de *Marek Blahuš* pri Toki Pona (Beiheft 18 [GIL-aktoj]) kaj de *Detlev Blanke* pri 20 jaroj Gesellschaft für Interlinguistik, GIL (Beiheft 18 [GIL-aktoj]).

### 6.2 „Esperantisto Slovaka“ 1946-2000

Krom la interretaj paperaj revuoj estas senŝanĝe gravaj informfontoj pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj de Esperanto. Tio aparte validas pri la historiografio de la Esperanto-movado. Ĝuste en revuoj troveblas multaj detaloj, ofte ne konservitaj aliloke.

Antaŭ nelonge aperis jena biografio:

*Vajs, Ján/ Fajth, L'ubomír (2012): Esperantisto Slovaka – Bibliografio kaj historio 1946-2000. Partizánske: Espero, 195 + 3 koloraj p. (ISBN 978-80-89366-13-2).*

Laŭ amplekso kaj kvalito mi ne konas kompareblan bibliografion, kiu tiel multflanke alirebligas la enhavon de revuo. La aŭtoroj faris ege precizan kaj bone trapensitan laboron, kiu ebligas tre bone kompreni la grandan agadon, kiun faris slovakaj esperantistoj. Tiu ĉi bibliografio povas esti rigardata modelo por similaj bibliografioj. La bibliografio ekzistas kiel printita eldono kaj sur kompaktdisko.



(Pri revuoj ankaŭ komparu: *Hernández Yzal, Luis N./ Máthé, Árpád/ Molera, Ana Maria (2010): Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto. Budapeŝt: Bibliografia Fondiĵo Luis M. Hernández Yzal, 1155 p.*)

Por ebligi imagon pri la riĉeco de la bibliografio kaj la elektita strukturo, jen la enhavtabelo:

- |  |  |
|--|--|
| 1. ANTAŬPAROLO de eldonisto                        | 3.6.5. Fervojistoj   |
| 2. HISTORIO DE ESPERANTISTO SLOVAKA 1946 – 2000    | 3.6.6. Pedagogio   |
| 2.1. Enkonduko                                     | 3.6.7. Religio   |
| 2.2. Periodoj de Esperantisto Slovaka              | 3.6.8. Kulturo   |
| 2.2.1. Unua periodo 1946 – 1951, postmilita        | 3.6.9. Medicino  |
| 2.2.2. Dua periodo 1957 – 1968, malmola socialisma | 3.6.10. Scienco kaj tekniko  |
| 2.2.3. Tria periodo 1969 – 1989, libera socialisma | 3.6.11. Skoltoj  |
| 2.2.4. Kvara periodo post 1990, postsocialisma     | 3.6.12. Speleologio  |
| 2.3. Personoj kiuj laboris en la redaktejo         | 3.6.13. Sporto   |
| 3. BIBLIOGRAFIO                                    | 3.6.14. Turismo  |
| 3.1. Enkondukoj                                    | 3.6.15. Vegetarismo, naturprotektado                               |
| 3.1.1. Redaktaj enkondukoj                         | 3.6.16. Filatelistoj   |
| 3.1.2. Politikaj enkondukoj                        | 3.7. Priskriboj de Slovakio kaj slovakoj                           |
| 3.1.3. Aliaj enkondukoj                            | 3.8. Vojaĝpriskriboj   |
| 3.2. Ĉefartikoloj                                  | 3.9. Vivpriskriboj   |
| 3.3. E-movado en Ĉeĥoslovakio                      | 3.10. Diversaĵoj   |
| 3.4. E-movado eksterlanda                          | 3.10.1. Nekrologoj, funebroj                                       |
| 3.5. Verkoj  | 3.10.2. Recenzoj   |
| 3.5.1. Originala prozo                             | 3.10.3. Leterkesto   |
| 3.5.2. Originala poezio                            | 3.10.4. Krucenigmoj  |
| 3.5.3. Tradukita prozo                             | 3.10.5. Enketoj  |
| 3.5.4. Tradukita poezio                            | 3.10.6. Humoro, ŝercoj   |
| 3.5.5. Aliaj originaj verkoj                       | 3.10.7. Anoncoj  |
| 3.5.6. Aliaj tradukitaj verkoj                     | 3.10.8. Interesaĵoj  |
| 3.5.7. Kantoj                                      | 4. REGISTROJ   |
| 3.6. Faka kaj hobia agado                          | 4.1. Registro de fotografaĵoj                                      |
| 3.6.1. Esperanto                                   | 4.2. Registro de bildoj kaj ilustraĵoj                             |
| 3.6.2. Lingvo                                      | 4.3. Registro de aŭtoroj   |
| 3.6.3. Paĝoj por infanoj                           | 4.4. Registro de personoj  |
| 3.6.4. Junulara anguleto                           | 4.5. Registro de E-organizaĵoj                                     |
|  | 4.5.1. E-klubo kaj rondetoj en Slovakio                            |
|  | 4.5.2. Teritoriaj kaj landaj organizaĵoj (Ĉeĥoslovakaj)            |
|  | 4.5.3. Fakaj, hobiaj, politikaj, religiaj organizaĵoj kaj lernejoj |
|  | 4.5.4. Eksterlandaj organizaĵoj                                    |
|  | 4.5.5. Muzikgrupoj   |

### 6.3 „Zagreba Esperantisto“ 2007-2012

*Pleadin, Josip (2013): Bibliografio de artikoloj aperintaj en „Zagreba Esperantisto“. Zagrebo: Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), 32 S. (ISBN 978-953-55418-1-3)*

La bibliografio entenas du sekciojn: liston de alfabete ordigitaj aŭtoroj kun iliaj artikoloj (p. 5-21) liston de artikoloj nesubskribitaj (verŝajne plej ofte verkitaj de la redaktoro, p. 21-32). Nur laŭ la enhavo eblas konkludi ke la bibliografio ampleksas la periodon de 2007-2012.

#### **6.4 Detaloj pri la selekta bibliografio de *Irimi kaj Reinhard Haupenthal***

